


Sesio: _____	
Lando: _____	
Dato: _____	

Kodo de la kandidato:

2	0	1	'			-					-				-	0		
---	---	---	---	--	--	---	--	--	--	--	---	--	--	--	---	---	--	--

Nomo de la kandidato: _____

DEKLARO

Subskribinto _____, ekzamenkandidato en la supre indikitaj sesio kaj nivelo akceptas, ke la antaŭkomisiona parto de mia parola ekzameno okazu ne antaŭ ĉeesta ekzamenkomisiono, sed ĝi disvolviĝu tra elektronika rimedo, pere de interreto.

Mi konscias, ke tia ekzameno povas misfunkcii pro neantaŭvideblaj teknikaj kialoj, pro kio mi ne kulpigos la organizantojn.

Okaze de teknika misfunkciado mi pretas kunlabori kun la organizantoj por trovi alian, por ambaŭ flankoj oportunan daton kaj okazon por la ekzameniĝo. Miajn kromkostojn pro la eventualaripeto de la ekzamena parto mi ne rajtos postuli de la organizantoj kaj de la ekzamen-centro.

Mi konscias, ke je eventuala malbona funkciado de la retkonekto aŭ se pro alia kialo mi malbone aŭdos la instrukciojn aŭ la parolantajn ekzamenantojn, mi rajtos peti ripeton de la demandoj. En kazo de vera problemo, mi rajtos reklamaci kaj peti la interrompon aŭ ĉesigon de la ekzamenado.

Tiun mian malkontenton mi rajtas anonci jam antaŭ ol oni deklaras la ekzamenparton finita aŭ plej malfrue fine de mia antaŭkomisiona ekzamenparto.

Se la antaŭkomisiona ekzameno okazas antaŭ la laboratoria parto, kaj pro teknika kialo ne eblis akcepteble fini la parolan parton, mi povas peti nuligon de mia aliĝo al la parola ekzameno kaj repagon de mia ekzamenkotizo.

En kazo, kiam la antaŭkomisiona parto okazos post la laboratoria parto, tia nuligo ne eblas kaj la ekzamenkotizon, eĉ se la parola ekzameno estis interrompita kaj ne finita, UEA ne estas devigata repagi, sed devas ebligi ene de unu jaro en la sama valoro ie trapason de KER-ekzameno.

Rimarkendas, ke en kazo, kiam inter la laboratoria kaj antaŭkomisiona partoj pasas pli ol 2-monata periodo, la rezultoj ne estas kunigeblaj kaj mi devos ripeti ankaŭ la laboratorian parton.

Antaŭ la ekzameno/Dato _____ Subskribo: _____

Post la ekzameno

Mi, _____ atestas, ke en la ekzamenejo ĉeestis krom mi nur la sekvaj personoj:

kiuj al mi neniun malpermesitan helpon donis en la enhava parto de la ekzameno.

Per mia ĉi-suba subskribo mi konfirmas la akcepton de la antaŭkomisiona parto de la ekzameno kaj mi rezignas je ajna plua reklamacio pri teknikaj problemoj kaj malglataĵoj, rilate al tiu ĉi parto.

Dato/horo _____ Subskribo: _____